

PENSEO

N-ro 365

mar. / 2022

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro <http://www.eterno.cn/penseo/penlisto.htm>

Ángel Arquillos (Hispanio)



Ĉu mi devas morti por renkonti vin?

Silento...
 Ĉu mi devas morti por renkonti vin?
 angora silento bruegas...
 senfinan ĉielon mi devas trairi,
 angora silento akompanas min....
 Mi pretas vojaĝi,
 nur mankas la glavo
 aŭ akra ponardo,
 aŭ eble senfina silento
 amara, terura silento.
 Silento, silento, mortema silento...
 ĉu vi estas Dio?
 malbona silento certigis al mi,
 ke Dio ne veras
 ĉar Dio ne devas silenti
 kaj ĉio silentas...
 Mi kapablas aŭdi amaran silenton
 kaj Dio silentas
 silentas, silentas,
 kaj mia respondo silente forestas,
 forkuras kaj petas pardonon
 al vi kara Dio,
 Vero, fantazio
 ĉiame silenta
 ĉiame foresta,
 kaj mi ĉiam solas
 kun mia silento
 silento mortema.
 Senperspektiva
 Senperspektiva
 senpova,

mi grimpadas,
 kaj mia menso
 senmova
 sur la pinto de la mondo,
 senvole daŭre vagadas.
 Kion mi serĉas konstante?
 Nur tristajn esperojn vanajn.
 Senfundamentajn
 senbazajn, trovas mi
 kontraŭ la vento senkalma.
 Senperspektiva
 senpova,
 malsupreniras
 du piedoj
 de la pinto de la mondo
 ĝis la nevera kvieteco.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Neonfloro

“Tial nek la plantanto estas io, nek la akvumanto; sed Dio, la kreskiganto.”

(1 Al la Korintanoj, 3:7)

Pluvadas senĉese
 dum tiu ĉi semajnfino
 senfina de Januaro.

Jen per poŝtelefono
 venas bildo de floro
 heliganta la dimanĉon.

La brilo de la ĝojo
 de la doma florkolor’
 ne eblas en la poemo,
 verŝajne en simfonio.

Poezio silentas
antaŭ la beleco dia,
kiun ĝi ne povas esprimi.

La poeto ne ignoras
la povon de l' adjektivo,
kiu nure malhelpas
la plenecon de l' belo,
kiu nur al rigard' montriĝas.

Juiz de Fora, 09/01/2022.


Konstrujejo

Konstruiĝas la poeto:
oni serĉas versojn
malfermitajn al ŝaŭmo, sablo,
nekonstanteco nuba,
rideto de l' river', kiu fluas
por brakumi la maron...

Oni serĉas poemon
el silent' kaj poezio
por survesti per lumo
konstruatan animon.

Juiz de Fora, 10/02/2022.

Rita Mkrtchyan (Armenio)



Pentristo Vintro nokte kolorigis
Per blanka farbo arbojn kaj la stratojn,
Kaj atenteme sekvis la flugadon
de etaj "muŝoj" tra fenestro nigra kato.
Haltejo laŭvica— Februaro,
Ĉu eblas per neĝer' leteron sendi?
Pri la espero, pri feliĉ' kaj bonaj tagoj,
Ne scias, sed ne ĉesos ni atendi...



Elsa Sylvie Marinelli (Usono)



Baldaŭ la fino de Geheeno

la tempo ŝanĝis sian vizaĝon,
fariĝis pli kruela kaj sensenta,
rikanis, manipulis kaj mortigis,
ĉiam sin protektis kapable...

foriris por ĉiam la antaŭa vivo,
kun ĝentilaj viroj kun afableco,
kiuj kapablis venki la amkoron,
kreinte amlibron de l' ekskluzivo...

restus diligenta en la foreco,
la fraŭlinoj honestaj kaj timemaj,
kiuj ne ŝatis fumi nek drinkis,
malantaŭe de propraj geparencoj...

perdiĝis la vera amo en folioj
de historio en malproksimeco?
eble homar' transformiĝis egoisto,
entute forgesinte pri la humaneco...?

ne kaj ne! malgajnis la krueleco,
baldaŭ la Suno revenus denove,
malgraŭ la sufero, senhumaneco
en fino jam videblas la Lumo denove!

12/2/2022

Jevhenija Slovaĉevska (Ukrainio)



Ukraina Patrujo! Kion fari mi povas
Por ekvidi, ke vento viajn plagojn forblovas?
Kion povas mi fari, por ke horda anaro
Transformiĝu je fumo sen milita brularo?

Por ke homoj vekiĝu kaj komprenu eliron
El koŝmara nebulo de malicaj deziroj,
Por ke ni forgesu niajn oldajn ofendojn
Kaj brak-en-brake leviĝu al la sankta defendo,

Por ke tiuj rezignu al Mordoro obei,
Ŝteli landojn, perforti, for de l' hejmo perej,
Por ke tiuj, Rusie, kontraŭ sia putino
Levu korojn kaj pugnoj, lin faligu finfine!

Belulino Rusio, parazitojn ekskuu,
Per riveroj ekplaŭdu, per arbaroj ekbruu,
Per homkoroj malfermu vivopaĝon pli indan!
Ĉesu esti senforta, fihumila kaj blinda!

Ho, Ukraino-Patrujo! Mia kor' estas via.
Via viv' estas mia. Kaj pasinta, kaj plia.
Kion fari mi povas por ke vi estu viva?!
Iru for, la milito, al militaj arkivoj!

19.02.2022

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Urbeto tra la nokto

Nun venas ankoraŭ la nokto
ekkovranta tiun ĉi urbeton
per sia tre larĝa kurteno.
La urbeto falas en silenton.
Marŝante laŭlonge la straton,
el kuirejoj vi eble vidas fumon
serĉante vojon tra la mallumo.
Tie patrinoj preparas ĉefmanĝon.
Mankas nokto-vivo de urbego,
sed la urbetanoj trovas manieron
por pasigi noktotempon kun ĝojo.
La urbeto trovas ankaŭ feliĉon.

Kefa, Timoro, januare 2010

Belsono el la ĉielo

Al Wolfgang Amadeus Mozart

Jam multfoje via bela muziko
akompanas min dum mia longa serĉo.
Mia koro dronas en senfinaj melodioj
ordonantaj paŝojn de tempo-vojaĝo.
Ĉiufoje kiam mi aŭskultas vian belan
muzikon,

mia koro plenas je fluo de paco
venanta el la vasta ĉielo,
vere tio similas voĉon de anĝelgrupo.
Kvazaŭ vi ĉiam invitus min por ekpaŝi
atingi la centron de ĉi tiu belsono,
sin kaŝanta en malproksima loko gardata
kaj via muziko fluas ĝis ĝia interno.
Via nomo, via voĉo transiras landlimojn
kaj plenigas la korojn de ĉiu generacio
samkiel gepraava historio konservata
por la generacioj loĝantaj surtere.
Tiu ĉi belsono venas el la Eternulo
kaj fluas tra la beleco de via muziko.
Mia koro fluas en la aŭskult-ĝojo
kaj gloras mi la Reĝon de ĉielo.

Jogjakarto, oktobre 2012

Marzena Wawrziczko (Pollando)

ni estas, ne estas morto
kaj ĉiu foriro estas nova komenco
mi povas vidi la strukturon ŝanĝi ĉion
ĉar mi vivas en senfina ciklo

do kiam mi kuras sur la herbo antaŭe
mi kuras la plej bela, mi estas la kurado
ĝoja rido, vivo kun spiro
kaj ne kantoj forvelintaj

respekti vin mem estas bonega arto
aprezi momentojn teksitajn de eterneco
danco de iomete implikitaj spiroj
kaj la pluvo sur la mano estas festata

kaj kiam mi estas tiel proksima al morto
mi diras kun rideto "saluton post
momento"

vi klakas viajn fingrojn, tiuj pupiloj
en alia vi malkovros novan enkarniĝon

**

mi malkovras novajn gustojn kun vi
kiaj plantspecoj en iu herbo
vi ĉiam vidos, mia kamarado
homo el la arbaro, el lagoj, el malsekregionoj

el la mondo, kiun li spertis hieraŭ
riĉaĵoj, de la tempo de ĝia abundo
li povis nutri la liberajn kaj la fortajn
kiuj pensas kun la koro de vivsaĝo

neniu malutilo al la ceteraj tia bonfarto
kaj malofta en kuirartaj programoj
ili scias, vi impresas vian per viaj ideoj
amikoj, familio kaj ĉi tiu sinjorino

li evoluigas sian herban pasion en la kuirejo
li ludas per vorto, ĉirkaŭsaltante per kulero
mi zorge rigardas ĉiujn paĝojn
li aranĝas herbajn festenojn kun vi

Jadranka Miric (Serbio)



Dediĉita al Tago de Amo

Vi kaj mi
kaj vojetoj du .
Je vojkruciĝo estis ni
sed decidis neniam plu!

Pasis tempo multa
de tiam. Ni maljuniĝis.
Preskaŭ forgesis ni pri eraro stulta.
Tial fido inter ni pli fortiĝis.

Vivo donas al ni multe da tento.
La plej malbela estas eki militi.
Oni perdas ĉion se tiu sento
longe daŭras. Beata estu kiu militon
emas eviti!

Rigardo desupre

Iama plena abeluja ebenaĵ',
rande ĉirkaŭata kun verda arbar'.
troviĝanta super la urbo, sur altaĵ'
situis nova tombej' por sia loĝantar'.
De tie urbo videblas
kaj vojoj al oriento kaj al okcidento.
Via tombo staras dekstre je oriento .

Apenaŭ mi ĝin trovas.
“Jen, taso da nigra kafo”
ĉio laŭrite. “Via morto kiel pafo”.
Larmoj anstataŭ franja saluto.
Aŭdiĝis lamentado. Apud la vojeto puto.
Via filo divorciĝis,
via nepo jam en vartejo,
Aliaj studentoj fariĝis,
dum vi , povra , staras sur altaĵ' de
abelejo.
Rigardas vi nin de sur blua ĉiel'
kun eternaj franjoj kaj kun Norda stel'.
Kiel reĝino el eternec' nin forakompanas
frumatene, ĉielokule eterne resalutadas.

Elena Popova (Bulgario)



Kontenta vintro

Vintro juna sperta
plektis novajn vestojn
kaj rapide, volonte vestis la monton.
Rigardas ĝi, admiras—
ĉio blankas, spiras.
La viv' ĉie estas
sub la varmaj vestoj.
La Vintro dormetis
kaj sonĝe ridetis...

Blagoj de la luna

La lun' min invitis:
—Vi amon meritias.
Mi sendos rapide
lulilon de radi' .
Mi vin ja renkontos
per amo, sincere.
Nur havu esperon
al mi, ido tera!
Al vi mi rakontos
pri la voj' libera
kaj vastaj' senlima
por via animo.

La lunaj promesoj
nokte ja sukcesas...

Ivanička MAĜAROVA (Bulgario)



Psikaj pensoj

Pordo mi malfermis
por ke la amo veni.
Ĝi forkuris.

Subite falanta neĝo
kovris tutan teron.
Mian animon restis nuda.

Fermegis mi la pordon
por ke ne venu angoro.
Restis la soleco.

Varma aŭtuno min
allogis la ekstero.
Rapide mi vestis min kaj
sidiĝis malantaŭ la fenestro.

Sincere ŝi preĝis al Dio
senkulpigi siajn estontajn pekojn.

Entrinkis oni je malgajo glutojn
da maldolĉan vinon pro rekviemo.
Iu diris : "Je via sano".

Ebrie de amo ili promesis
sin al eterna fideleco.
Sekvantan tagon ili malsorbriĝis.

Li diris al sia amatino,
ke li ne povus vivi sen ŝi.
Tuj ŝi forlasis lin.

Dum la tempo de la ŝanĝo
kaj la vetero de la ŝanĝo
ŝanĝis sian direkton.

La amo estas frenezeco de la dua,

ĝis la momento kiam
intervenis al ili tria.

La viroj admiras saĝan virinon,
sed malofte edziĝas al ŝi.

Razgrad, Bulgario

Maro de sonoj
alflugis el senlimoj.
Tenera nokto.

Oranĝa floro
en fraŭlina harar'.
Ekstravaganco!

Taso da kafo.
En ĉambro sonas bluso.
Animo ĝemas.

Vesperkrepusko.
Sur pavim'tintis paŝoj.
Ŝi iras sola.
Vesperkrepusko.
Sur pavim'tintis paŝoj.
Ŝi iras sola.

La manoj petas
bluson. Piano tristas.
Botel'da "Sherry".

Charles Bukowski

Duŝado

Poste ni iras ĉiufoje sub la duŝon.
Mi ŝatas la akvon, se ĝi estas tre varma,
ŝi ne tiom, kaj ŝia vizaĝo estas ĉiam
tute mola kaj paca.
Kaj ŝi lavas min ĉiufoje unue,
ŝi sapumas mian ovosaketon, levas la ovojn,
premas ilin, poste ŝi lavas mian kacon.
„He, ĝi ja eĉ ne plu rigidas!“
Poste ŝi lavas mian tutan hararon malsupre
ĉirkaŭ la sako, la ventron, la dorson, la
gambojn.
Poste mi ŝin lavas. Unue la piĉon.

Mi staras malantaŭ ŝi, havante mian kacon
inter ŝiaj postpartoj,
kaj ŝaŭmumas delikate ŝiajn piĉoharojn;
mi lavas ilin lante kaj sen hasto,
mi bezonas por ili multe pli da tempo
ol necesus efektive...
poste la genukavojn, la femurojn,
la postafon, la dorson,
mi turnas ŝin, kiŝas ŝin,
sapumas ŝiajn mamojn, la ventron, la kolon...
la genuojn, surojn, la piedojn...
tiam ankoraŭfoje la piĉon, pro fortuno,
Ankoraŭfoje kiso, poste ŝi eliras
kaj frotas sin, kelkfoje ŝi ankaŭ kantas dum
tio...
Mi restas sub la duŝo, reguligas la akvon,
ĝis ĝi estos pli varma, mi ĝuas la agrablan
senton,
la miraklon de l' amo. Poste mi eliras,
kutime tiam jam estas malfrue posttagmeze,
kaj dum la vestado ni pripensas kune,
kion ni ankoraŭ devos plenumi hodiaŭ,
sed per tio, ke ni kunestas, la plej multaj aferoj
plenumiĝas jam per si mem, por diri la veron
— ĉio.
Kaj tiom longe, kiom tiel estas inter ino kaj
viro, por ĉiu el ili estas foje pli bone, foje pli
malbone, sed ĉiam denove alia. Por mi estas
eksterordinare bela memoro, ĝi super-daŭras
la almarŝon de armeoj, la klakojn de
ĉevalhufoj antaŭ la fenestro, la postguston pro
malvenkoj, doloroj kaj deprimoj...

Tradukis



Hans-Georg Kaiser
(Germanio)

Trikolora Pastoralo

Blankaj nuboj flosas trans la ĉielo blua,
Ŝafoj libere vagas kun la paŝtisto asidua.
La ŝafaro blankas kiel glimbrila arĝento,
Verdaj herboj ondiĝas per la freŝa vento.

Ŝanĝo de Vizago

Mi ne vidas la sunlumon,
nek flaras floran parfumon.
La terlando senkolora griza
estas dezerte karakteriza.
Mi aŭdas neniun saluton,
nek sentas aman atributon.
Ĉiu ŝajnas sur batalkampo
rapidi kun piedo-stampo.
Kiu ŝanĝis nian mondon?
Ŝi perdis la antaŭan fronton.
Kiam vi ŝiajn larmojn perceptas,
ŝi neniun konsolon akceptas.
Haltu nun! mi nepre diru,
por ke ŝi ne plu subiru.
Sen amo ĉio indiferentas;
Ĉu vi ne pentas?

Rememoro en la pluveto

Mi promenas en la pluveto frekvente,
Serĉante ion en la pluveto prudente.
Pluveto kiel flirta poemeto kvazaŭas,
Kaj ŝvebante ĉe mia koro ĉirkaŭas.
Dezerte en pluveto mi estas soleca,
Sed sen montriĝo sur la vizaĝo deca.
Ĉiufoje kiam pluveto ŝvebas apude,
Mia rememoro ĉiam vekigiĝas sentrude.

elĉinigis



Yi Qiao
(ĉino en Germanio)

Mimoza Ahmeti



PRETERE

Hodiaŭ pentristo alvenis nian urbon,
Ĉiujn geniajn signojn li posedis,
Eĉ ankaŭ la suferan rideton, porĉiaman.
Alvenis,
Kun kostumo je distanca koloro kaj provinca
desegno,

Kun malgrandigitaj okuloj pro la longa ama
atendado.
Mi vidis lin kaj li vidis min. Pretere.

Tutan tagon mi vagadis je mia plezuro,
Promenis kun la miaj,
Kuiris kafon al kelkaj amikoj.
Sed kiam posttagmezo finiĝis kaj la krepusko
enfalis,
Vespero froste malvarma kun stelaj ŝtonoj
desupre,
Neatendite, mi rememoris pri la nova
alveninto
En nian urbon,
Pri liaj longaj manoj kiuj, certe
Tiun momenton unu la alian frotis,
Pri lia enpenŝigema rigardo
Sur la benko de soleco,
Pri la okulkavaĵo profundiganta
Pro la ŝokiĝo pro homoj.
La glaciaj littukoj
Kaj iliaj maldikaj fastoj
En la malvarma hotela ĉambro
Ĉu ili sukcesos varmigi
Lian malvarmiĝintan spiriton!
Elalbanigis



Bardhyl Selimi
(Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Zhao Ding (1085-1147)

—laŭ melodio *Rivero plenruĝa*

Grizaj nuboj amasiĝas
sur aŭtuna la ĉielo.
Okcidenta vent' alblovas
la pluveton strie al la tero.
Mi direktas la rigardon
tra nebula pluvmantelo:
la migrantaj birdoj en linioj

flugas kun leĝero,
falas sur la sablobenkon.
Povas ne distingi en malhelo
mi l' situon de hejmloko mia.
Pro l' vuala pluvo en ventpelo
mi ne vidas klare l' monton
nur rubando verda flosas sur rivero.

Mi vagadas aliloke,
kiel gasto provizora
en la mondo vasta kaj senlima.
Mi ja splenas kun ĉargrenoj sola
kaj sur vert' jam kreskas grizaj haroj.
Mi lamentas jen kun sent' dolora,
ve, gratante mian kapon vane.
Sen atendo mia, pro milit' horora,
mia famili' disiĝis en maljuna aĝo mia.
Nun nur la efiko alkohola
povas neniigi miajn kor-ĉagrenojn.
Sed alkoholaĵo povos en drinkado fola
elĉerpiĝi, sed ne splenoj forpeliĝos.
Eĉ se mi drinkus kun glutemo vora
la riveron tutan da alkoholaĵo,
ĝenoj miaj ĉiam restus en profundo kora.

Xiang Ziyin (1085-1152)

—laŭ melodio *Reveno de amato*

Neĝflokaj grandaj dance flirtas
cis kaj trans la rivero.
La nordo okupita de la malamiko
ja dronas des pli en severa gelo.
Rigardi penas mi tra densaj nuboj
la tri pasejojn ĉe limregiona sfero,
sed montoj baras al mi la vidon.
Kiaj ĉargenoj min turmentas kun kruelo!

Eĉ se l' ĉielo povus oldi,
kaj povus renversiĝi l' maro,
tre malfacilas min senigi
je la rankoro de l' ŝtat-falo.
Mi ofte aŭdas, ke senditoj
vojaĝas laŭ palaca la deklaro
por informiĝi pri sanstato
de la imperiestr' kaptita en amaro.

Do, kiam la kaleŝo reĝa
lin portos al palaca halo?

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Zheng Wenbao (953 - 1013)

Disiĝo de amiko

Ornamita ŝip' sin ankras ĉe printempa lago,
ĝis amiko duon-ebriĝas de grenbrando.
Ĝi transportas, spite l' elementojn en la svago,
plenan malĝojecon de disiĝo al sudlando.

Wang Yuchen (954 - 1001)

En festo de Mortintoj

Dum Festo de Mortintoj enue vivis mi,
Kiel enmonta bonzo, sen floroj, sen ebri'.

Hieraŭ de najbaro mi petis lampofajron,
Kaj legis ĉe fenestr' ĝis aŭrora ekradi'.

Promenado preter vilaĝo

Flaviĝas krizantemoj, mi rajdetas sur ĉevalo
laŭ monta pado, impresite pri l' pejzaĝo kruda.
L' aŭtuna vento estas ehiĝanta en la valo,
en vesperruĝo la montopintaro restas muta.
Folioj de sovaĝaj piroarboj nun karminas,
dum fagopiraj floroj neĝe blankaj bonodoras.
Sed kio, kiam mi recitas versojn, min afliktas?
El la vidaĵo mian hejmolokon mi memoras.

Anonima (inter 960-1279)

En la homa mondo

En la homa mondo, kiun prilumas la luno,
kiom da familioj ĝojas, kiom da malĝojas?
Nun geedzoj dormas en la sama litkurteno,
sed aliaj vagas fremdaloke kaj dumvojas.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-SEPA

Fabloj

§27-04

Yancheng Ziyou diris al Dongguo Ziqi:

“Post kiam mi komencis sekvi viajn instruojn, mi travivis la jenajn statojn: post unu jaro mi fariĝis simpla kaj naiva; post du jaroj mi fariĝis akomodigema; post tri jaroj mi atingis klaran komprenon; post kvar jaroj mi identigis min kun la estaĵoj; post kvin jaroj la estaĵoj envenis en min; post ses jaroj la spirito penetris en min; post sep jaroj mi perfekte harmoniiĝis kun la naturo; post ok jaroj mi forgesis la morton kaj la vivon; post naŭ jaroj mi komencis vagadi en la mondo de la Granda Mirindo.”

§27-05

Tiu, kiu senbride agas, provokas sian morton. Memoru, ke homo mortas pro ia aŭ alia kaŭzo, sed li vivas per la vitala energio de la jango tute senkaŭze. Ĉu efektive povas esti tiel? Kiu loko konvenas al vi kaj kiu loko ne konvenas al vi? En la ĉielo troviĝas la suno, la luno kaj la steloj, kaj sur la tero troviĝas la homoj. Sed ĉu mi povas malkovri la kaŭzon de ĉio ĉi tio? Se oni ne scias la finon de la vivo, kiel do oni povas aserti, ke ne ekzistas la destino? Se oni ne scias la komencon de la vivo, kiel do oni povas aserti, ke ekzistas efektive la destino? Se ĉiuj estaĵoj povas komunikiĝi inter si, kiel do oni povas diri, ke la spiritoj ne ekzistas? Se ĉiuj estaĵoj ne povas komunikiĝi inter si, kiel do oni povas diri, ke la spiritoj ekzistas?

§27-06

La duonombro demandis la ombron: “Ĵus vi vin klinis malsupren kaj nun vi vin rektigas; ĵus viaj haroj estis ligitaj supren kaj nun ili estas dise pendantaj; ĵus vi sidis kaj nun vi staras; ĵus vi promenis kaj nun vi staras senmove. Kial do ĉio tio?”

“Kial vi demandas tiajn bagatelajn demandojn?” demandis la ombro. “Mi ja faris tiujn agojn, sed mi ne scias kial. Ĉu mi estas kiel la ŝelo de cikado aŭ mi estas

kiel la haŭto dejetita de serpento? Mi aspektas kiel la efektivaĵo, sed mi ne estas identa kun ĝi. Mi aperas kun la lumo de flamo aŭ de la suno kaj malaperas en la obskuro aŭ en la nokto. Ĉu mi dependas de la reala objekto? Sed la reala objekto mem ja dependas de io alia! Kiam la reala objekto venas, mi venas kun ĝi; kiam la reala objekto foriras, mi foriras kun ĝi; kiam la reala objekto moviĝas tien kaj reen, mi moviĝas tien kaj reen. Kio do estas demandinda pri ĉio tio?"

§27-07

Survoje suden al la urbo Pei, Yang Ziju volis iri al la ĉirkaŭurbo de Pei por renkontiĝi kun Laŭzi, kiu tiam vojaĝis al la regno Qin. Ili renkontiĝis en la kamparo ĉirkaŭ urbo Liang, la ĉefurbo de la regno Wei. Sur la mezo de la vojo Laŭzi levis la kapon al la ĉielo kaj eligis suspiron, dirante: "Komence mi pensis, ke vi estas instruebla, sed nun mi ne tiel pensas."

Yang Ziju ne respondis, sed kiam ili atingis iun gastejon, li alportis pelvon da akvo, mantukon kaj kombilon al Laŭzi. Poste li demetis de si la ŝuojn antaŭ la pordon, eniris sur la genuoj ĝis antaŭ Laŭzi kaj diris:

"Ĵus mi volis meti al vi demandon, sed ĉar al vi mankis la tempo pro marŝado, mi ne kuraĝis vin ĝeni. Nun ke vi havas liberan tempon, ĉu vi permesus al mi demandi pri mia kulpo?"

"Vi vin montras fiera kaj aroganta," diris Laŭzi. "Kiu volus resti kun vi? Sciu, ke la plej alta virto montriĝas humila kaj la plej abunda virto ŝajnas nesufiĉa."

Yang Ziju ruĝiĝis de honto kaj diris:

"Mi aŭskultas kun respekto vian instruon lecionon." Kiam Yang Ziju alvenis al la gastejo, la gastoj eliris por lin bonvenigi. La mastro de la gastejo aranĝis al li la sidmaton kaj la mastrino prezentis al li mantukon kaj kombilon. Ĉe ekvido de li, la gastoj konkure cedis sian sidlokon al li, kaj tiuj, kiuj sidis proksime de la hejtoforno por sin varmigi, paŝis flanken por doni al li la lokon. Sed nun, kiam Yang Ziju revenis post sia interparolo kun Laŭzi, la aliaj gastoj de la gastejo konkuris kun li pri la plej bona sidmato.

Elĉinigis



Wang Chongfang
(Ĉinio)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbio)

Ŝatas ni dialogojn!

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Vetera
plibonigado.
iom post tom varmas
veter'. Ĉie festado
pro terflorado.

Printempe
ekis inundoj
Danĝeroj multoblis.
Ekas teroglitadoj,
ŝanĝos fi-taĵoj!

En mondo
nova la danĝer'.
Nova koloniismo
floranta! Velkas esper'
pro militaper'!

Eŭropo
ŝanĝiĝis multe,
Ĉu civitama milit'???
Ĝi regas tre stulte
Mensogas laŭte!

Necertec'
en aer' pendas.
Kvazaŭ homoj ne scias
KE nur dialog/o/as
ni pacon gardos!

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).



Luiza CAROL (Israelo)



La Florhomo

Mi ekvidis ĝin de malproksime. Tiun seren an someran dimanĉon, mi estis grimpinta en la montaro ekde frumatene kaj ĵus haltis por ripozi. Mi estis freŝa abituriento kaj alvenis al tiu fora lando, por pasigi kun mia familio agrablajn feriojn en la pura aero de la montaro. Tiun tagon mi decidis grimpi tute sola en la silento de la arbara pado, por mediti trankvile, ĉu mi aliĝu al la fakultato de biologio aŭ al tiu de astrofiziko. Mi rigardis suben al la ŝoseo kiu serpentumis el la larĝa valo, kaj ĝuste tiam mi ekvidis... ĝin! Ĝi similis sorantan sunfloron kaj ĝi estis nekredeble bela, en la tagmeza sunlumo. Mi supozis, ke ĝi estas kajto aŭ eble soranta fotilo. Ĝi estis supreniranta malrapide el la valo kaj moviĝanta tra la aero samkiel granda orkolora meduzo moviĝus en akvo. Ĝi proksimiĝis kaj turniĝis super mia kapo kelkan tempon. Mi jam povis vidi, ke ĝi estis nek kajto nek fotilo. Sed kio ĝi estis?

Kiam ĝi proksimiĝis je distanco de nur kelkaj paŝoj, de sub la flor-aspekta aĵo videblis tigo kun verdaj folioj kiel brakoj. Ĝi malfaldis delikatajn radikojn, per kiuj ĝi alkroĉiĝis al apuda stumpo. Mia konsterno aliformiĝis en supozon, ke mi ekdormis kaj estas songanta. Trifoj mi provis fermi la okulojn kaj denove malfermi ilin, por kontroli ĉu la vizio malaperus. Ĝi ne malaperis. Tio kion mi havis nun antaŭ miaj okuloj povus ŝajni tute normala sunfloro. Tamen ĝi radiis ion strangan kaj samtempe allogan, ion kion mi ne kapablas nun priskribi.

“Saluton!” ĝi diris malrapide, per kantanta virina voĉo.

“Saluton!” mi respondis ridante. “Ĉu vi estas parolanta roboto?”

“Ne. Mi estas florhomo de alia planedo.”

Mi jam ne kuraĝis moviĝi, timante ke mi vekigis kaj tiam la bela songo forvaporigis. En mian memoron revenis malnovaj fabeloj, kaj mi ekpensis ke eble mi renkontas sorĉitan belulinon, kiun mi heroece malsorĉos... Mi demandis:

“Ĉu vi fakte estas homo?”

“Jes kaj ne” ĝi respondis. “Se vi nomas ‘homo’ estaĵon penskapablan kaj emocikapablan, laŭ tia difino mi ja estas homo. Sed mi havas korpon de planto, tial mi diris ke mi estas ‘florhomo’.”

Mi tute konfuziĝis. Sed ĝi aldonis, ke ankaŭ por ĝi estis granda ŝoko renkonti sur nia planedo parolantajn bestojn. Tamen ĝi jam alkiutimiĝis pri tio.

Mi demandis, ĉu mi estas dormanta dum ni parolas.

“Jes kaj ne” ĝi diris. “Vi troviĝas mezvoje inter dormo kaj maldormo.”

Laŭ ĝiaj klarigoj mi komprenis, ke ĝi kapablas vidi la bioenergiojn kiujn la estaĵoj radias. Tio signifas ke rigardante min, ĝi vidis la tremantajn nuancojn de la energioj agantaj en miaj menso kaj animo. Mi maltrankvile kaj iom timeme demandis min, ĉu ĝi kapablas influi min pere de hipnozo.

“Ne maltrankviliĝu, mi ne estas danĝera.” ĝi diris, kvazaŭ aŭdante miajn pensojn.

Mi demandis:

“Ĉu vi aŭdas miajn pensojn?”

“Jes kaj ne...”

Mi jam malpacienis: “Ĉu vi ne povas respondi alimaniere ol ‘jes kaj ne’?”

Ĝi ridis por la unua fojo ekde kiam ĝi alvenis. Ĝia rido estis homeca, iom infaneca, bonhumora, trankvila, en kontrasto kun la stranga malrapideco per kiu ĝi prononcadis vortojn. Ĝi diris ke, se oni klopodas esprimi la veron, estas ofte malfacile respondi unuvorte. Kaj mi tutkore konsentas pri tio nun, kiam mi mem strebas priskribi tiun nekutiman eventon en mia vivo, apenaŭ trovante taŭgajn vortojn.

Ĝi aldonis:

“Jes, mi kapablas aŭdi viajn pensojn, sed nur kiam vi esprimas ilin pere de via voĉo. Alikaze mi ne aŭdas ilin. Tial mi respondis kaj ‘jes’ kaj ‘ne’ al via demando. Tamen laŭ la radiado de via bioenergio, mi vidas la kolorojn de viaj emocioj kaj konscias, kiam io maltrankviligas aŭ ĝenas vin.”

Laŭ ĝiaj klarigoj evidentiĝis, ke la vorto “mensogo” estas tre stranga por ĝi, ĉar ĝi ne kapablas kompreni, kial entute la “besthomoj” uzas la penskapablon por kaŝi siajn veraĵajn sentojn kaj pensojn. Ŝajnas ke dum jarmiloj, la tuta historio de la florhomoj baziĝis sur senĉesaj klopodoj evoluigi siajn

esprimkapablojn, por kundividi siajn verajn sentojn kaj pensojn. Evidentiĝis, ke tiu tasko estas ju pli malfacila, des pli ilia spirita vivo fariĝas pli kaj pli prilaborita. Sed ajna klopodo kundividi falsajn sentojn kaj pensojn ŝajnis al ili absurda.

La florhomo nomis sin Mirabela, ĉar tiun nomon ĝi ricevis sur la tero. Maljuna sinjorino, ĉe kiu ĝi loĝis dum ĉirkaŭ du jaroj, nomis ĝin tiel, kaj al ĝi plaĉis tiu nomo. Ni babilis longtempe. Ĝi rakontis interesajn aferojn pri si mem kaj sia fora planedo. Ĝi diris, ke tie ekzistas multaj aliaj plantoj kaj tre multaj bestoj, sed nur la sunfloroj estas penskapablaj. Oni povas kalkuli kelkdekon da specioj de sunfloroj, kaj ĉiu specio havas sian lingvon kaj siajn tradiciojn. Komunan lingvon ili ne havas kaj ne bezonas. Ili kapablas iel alproprigi diversajn lingvojn, pere de bioenergio. Kiam Mirabela estis ĉirkaŭirinta min antaŭ ol alteriĝi, ĝi iel trovis en mia cerbo la tutan vortprovizon de la lingvo en kiu mi estis pensanta. Tiam ĝia menso kopiis kaj iel komprenis ĝin. Plurajn detalojn pri tio mi ne scias.

Mirabela estis la lasta el aro da similaj estaĵoj, kiuj estis alvenintaj al nia planedo antaŭ pli ol du jaroj. Ili perdis la kontakton kun sia planedo, kaŭze de la elektra radiado ĉirkaŭanta la teron. Evidentiĝis, ke la florhomoj estas tre ĝenataj de elektronikaj aparatoj, kiuj ne nur malhelpas al ilia kapablo komuniki inter si, sed ankaŭ ege malsanigas ilin kaj endanĝerigas ilian vivon. Ajna aparato ĉu mekanika ĉu elektronika timigas kaj konfuzas ilin, kaj ili malkapablas protekti sin kontraŭ la rapideco de aŭtoj, busoj, trajnoj ktp. Entute surteriĝis 22 florhomoj, sed post 2 semajnoj nur Mirabela restis vivanta. La plejparton el ili mortigis rapidaj veturiloj, kemiaĵoj, televid-antenoj, telefon-antenoj, alt-frekvencaj polusoj ktp. Tri el ili sukcesis kontakti simpatian vilaĝanon, sed la konsekvencoj estis katastrofaj. Tiu homo ekteruriĝis, supozis ke temas pri danĝeraj alilandaj aparatoj por spionado kaj tuj anoncis la policon. Rapide oni kaptis ilin pere de malsimplaj elektronikaj aparatoj, oni radiografiis ilin kaj oni konkludis... ke ili estas simplaj sunfloroj. Kompreneble, post kiam la teruraj aparatoj mortigis ilin, ili fariĝis simplaj velkintaj floroj. Verŝajne, la vilaĝanon oni konsideris frenezulo...

Post kiam ĝi perdis ĉiujn siajn kunulojn, Mirabela

ploris longtempe kaj decidis eviti ajnan kontakton kun la homoj de la tero, kiujn ĝi jam timegis. Dum semajnoj ĝi iradis malgaje kaj solece en la montaro, kiel eble pli malproksime de homaj domoj kaj elektraj antenoj. Foje, dum forta pluvo kun hajlo, ĝi ŝirmis sin en izolita malplena fojno-ŝirmejo. Tie ĝi sidigis sola, pensante malgaje pri la strangaj homoj de la tero, kiuj ŝajnis al ĝi malicaj kaj absurdaj estaĵoj... Subite ĝi sentis sin tuŝita de ĝuste tia estaĵo, kiu elprenis ĝin en siaj manoj. Mirabela frostiĝis kaj fermis la okulojn, atendante la morton. Sed la estaĵo tenis ĝin delikate kaj alparolis ĝin tenere...

Tiel komenciĝis la ĉirkaŭ du-jara rilato inter Mirabela kaj s-ino Orlanda, la bonkora maljunulino kiu donis nomon al ĝi kaj gastigis ĝin unue en sia ĝardeno kaj poste ankaŭ en sia domo.

S-ino Orlanda estis ege maljuna emerita instruistino de bazlernejo. Ŝi ekamis la mirindan floron ekde la unua momento kiam ŝi vidis ĝin. Ŝi baldaŭ konsideris la instruadon al Mirabela kiel la pinton de sia kariero kaj eĉ la plej gravan sencon de sia tuta vivo! Ŝi uzis ĝisfunde sian dumvivan sperton por kuraĝigi kaj helpi la plej eksterordinaran lernanton, kiun ajna terana instruisto havis iam ajn...

Mirabela estis diligenta kaj scivolema. La florhomoj ne uzas skribadon kaj legadon sur sia planedo, sed ilia memoro multe transpasas la normalan memoron de la teranaj homoj. Mirabela kapablis aŭskulti sian instruistinon dum multaj horoj kaj parkerigi ĉion kion ŝi diris. Ĝi kapablis akumuli fulmrapide grandan kvanton da informoj, kvazaŭ ĝia menso estus komputilo. Sed ĝi ankaŭ komprenis kaj interpretis tre bone la informojn. S-ino Orlanda instruis ĝin legi flue dum nur unu horo. Poste, Mirabela legis unu post la alia ĉiujn librojn, kiuj troviĝis en la librobretaro de ĝia gastiganto. Ĝi elprenis po unu libron per siaj fortaj radikoj, metis ĝin sur la tablon kaj trafolumis ĝin pere de la folioj. Ĝiaj okuloj rapide fotokopiis la paĝojn, kaj ĝia memoro konservis ĉion, kio ŝajnis al ĝi interesa kaj eventuale utila.

La maljunulino ofte plendis pri diversaj doloroj dum ilia kunloĝado. Mirabela vidis kun bedaŭro la kolorojn de tiuj doloroj, komprenis la bioenergiajn malekvilibrojn kaŭzintajn ilin, kaj iom post iom lernis

